# HEJS JUNECO

1887 · 1987

## Hispana Esperantista Junulara Societo (H.E.J.S.)

JUNULARA SEKCIO DE H·E·F· - LANDA SEKCIO DE T·E·J·O·




**numero 130**
**julio - augusto**

*en ĉi numero vi trovos...*


- *Raportoj pri landa agado en Andaluzio Baskio kaj Katalunio.*
- *Noticoj diversaj.*
- *Kontraŭimperiismaj artikoloj: Ĉu la anglalingvanoj estas pli belaj ol la ceteraj? (Ferriol). La angla en la Festivalo pri Kino de Barcelona (Jesuo).*
- *Intervjuo al Alberto Franco, prezidanto de Hejs.*
- *Kultura Testo.*
- *Konkurso.*
- *La Zodiako.*
- *Humoraĵoj.*

...



*HEJS JUNECO*

*Revuo eldonata far Hejs kunlabore kun la Urbestraro de Santa Coloma de Gramenet.*

*Red. Jesuo Armengol.*

# notu bone

H.E.J.S. (Centra Oficejo)
Hispana E-ista Junulara Societo
Sol,75
41003-SEVILLA
Andaluzio
Tfno.(954)415991

.Madrida Oficejo ĉe
Madrida Esperanto Junularo
.Barcelona Oficejo ĉe
Atomo
(ambaŭ adresoj aperas ĉi-sube)

HEJS-Juneco
Jesuo Armengol (red.)
Fco. Moragas, 95.3-2
08922-STA.COLOMA DE GRAMENET
Katalunio
Tfno.(93)3865533

LA MANO
Georgo Camacho (red.)
Atocha, 98.4º
28012-MADRID
Madrid
Tfno.(91)2308798

## FEDERACIIĜINTAJ ASOCIOJ

-Andaluzio

Andaluzia Esperanto Junularo
Apdo. 611
14080-CORDOBA

Komitatano A
José Mª Rodríguez Hernández

-Katalunio

Atomo
Carreras Candi, 34-36
08028-BARCELONA

Sankta Kolomba Esperanto Grupo
Sant Josep, 20
08922-STA.COLOMA DE GRAMENET

Komitatano A por ambaŭ Jesuo Armengol Arbiol

-Madrido

Madrida Esperanto Junularo
Atocha, 98. 4º
28012-MADRID

Komitatano A
Georgo Camacho Cordón

-Aragono

Junulara Esperantista Societo Aragona
Apdo. 149
50080-ZARAGOZA

Komitatano A
Juan Carlos Nuño Casión

HEJS TENAS KONTAKTOJN POR FEDERACIIĜO KUN:
-Vitoria Esperanto Grupo(ĉe Rafa Blanco) Pza.Zaldiarán,1.6º 01008-GASTEIZ
-Valencia Esperantista Junulara Asocio Antonio Machado,6 46380-CHESTE

# Saluton



Somero, varmego. Jen Jesuo enirante en la akvon post prilabori Hejs Junecon. Sed Jesuo atentu! Vi ne rememoris, pri la krokodiloj...

Ha, la somero! Tempo por ĝui kaj flankenlasi la laboron. Ĉijare la somero plenas je eblecoj por renkontiĝi kun eksterlandaj geamikoj. . En la pasinta numero ni jam informis pri kelkaj internaciaj aranĝoj.

Sed kiuj vere ĝuos esperanton estas la partoprenantoj en la IJK en Krakovo. Dum ĉi numero eniras en la presejon la granda evento okazas. Pri ĝi vi povos legi en la venonta numero intere segan raporton far Georgo Camacho.

Denove mi alvokas ĉiujn esperantistojn por kunlaboro. Mi ja konsentas ke dum somero la aferoj ripozas. Sed ekde septembro la redakciejo atendas viajn leterojn.

Eble ĉi numero atingos vin malfrue. Temas pri du kaŭzoj: Poŝto kaj presistoj Sed malgraŭ la malfacilaĵoj en Barcelona ni laboras entuziasme por prezenti kiel eble plej agrablan revuon por interkontakto de hispanaj esperantistoj.

Nenio plia. Havu bonan someron, kaj se vi iros eksterlanden PAROLU ESPERANTON.

## Erartabelo

Preseraroj en la pasinta numero:

.Antaŭlasta paĝo, sepa linio
anstataŭ samkvarlaj.....samkvartalaj

.En serĉu la vortojn
anstataŭ astdrio.......asturio
" kastalio leono....kastilio

.En 6a paĝo, 6a linio
anstataŭ kumportas.....kunportas

NOTO. Certe vi konstatis ke en la pasinta numero ĉio estis skribita minuskle. Temas pri skribmaniero de la redaktoro. Ŝajne ne ĉiuj ŝatas tiun stilon. Do, ekde nun m mi uzos ĉefliterojn.

## Inter la legantoj

Mi kolektas la "internacio" n en pluraj lingvoj. Mi petas vian helpon. Sendu en kiu ajn lingvo vi ĝin havas. Mia adreso:
Joan Felip Artero

Carreras Candi, 36/ Barcelona 08028

## Solvoj de la krucenigmoj

REBUSO

— am' + pli + fiki

AMPLIFIKI

SERĈU LA VORTOJN

| | | | | | | | | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| k | a | n | t | a | b | r | i | o | ĉ | b | a | o |
| a | a | r | a | g | o | n | o | o | o | f | n | r |
| n | k | s | e | ĵ | j | s | i | i | ŝ | o | v | u |
| a | m | o | t | r | g | r | g | a | e | o | a | d |
| r | t | r | c | i | d | e | h | l | o | i | l | a |
| i | l | a | e | t | l | o | o | z | i | z | e | m |
| o | o | v | s | a | v | i | n | a | n | u | n | e |
| i | r | a | g | b | l | c | o | j | u | l | c | r |
| k | a | n | e | a | u | r | p | m | l | a | i | t |
| p | e | l | t | s | i | u | h | ĉ | a | d | o | s |
| ŝ | l | s | u | k | a | m | e | z | t | n | i | k |
| m | a | d | r | i | d | o | k | i | a | a | ĉ | e |
| k | b | v | t | o | ĥ | o | i | r | k | o | l | o |



# Coza exagerá

Jen ni informas pri la proponita estraro de Andaluzia Esperanto Junularo kiun oni devos konfirmi en la Toroksa Kongreso ĉi-jare.

Prezidanto .- Luis del Rio (Málaga).
Vicprezidanto-Kasisto .- Francisco J. Nieves (Jerez).
Sekretario .- José M. Rodríguez (Córdoba).
Vokaloj .- José J. Bravo (Granada).
Eduardo Gonzalez (Sevilla).
Francisco J. Romero (Málaga).

ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU ATENTU

Okazis ŝanĝo pri la dato de la 5a Andaluzia Kongreso. Pro kelkaj malfacilaĵoj (ĉefe pri loĝado) anstataŭ la monaton aŭgusto, ĝi okazos la 10, 11 kaj 12an de OKTOBRO.

Post senaktiveca periodo, pro ŝtelo de materialo, RADIO LUPA de Còrdoba denove elsendas sian programon pri esperanto. Ĉi foje ĉiu programo daŭras unu horon.

---

# leteroj el la kazerno.

"... jam de antaŭ du semajnoj mi estas en la trejnejo kaj mi ja ne scias kiel mi rezistas. Tage senhalte, ili bras paŭon et mi per tiom da trejnado, krioj kaj sermonoj pri la patrujo, la terorismo kaj drogoj; kaj nokte oni aŭdas la ratojn kuretadi serĉe de manĝaĵo tra la kompaniejo. Ili fine formanĝos min, ĉar mi plenas je malpuraĵo kaj nur havas unu tagon semajne por min duŝi. Imagu tio!


Poste mi iros promeni ĝis la vilaĝo. Iñaki ne povos veni (estas amiko mia), li estas arestita kaj mi eĉ ne scias kial, pro iu ajn stultaĵo. Mi pensas ke ĉar li estas basko, ili malamas baskojn! Mi aĉetos iujn ĵurnalojn (tiel mi poste povos doni al Iñaki), ĉar tie ĉi per "la stulta skatolo" kaj "El Alcázar" oni pri nenio scias, aŭ pli bone dirite, oni nur scias pri kio ili volas.

Pasintan tagon ja okazis skandaleto. Jam post la noktomanĝo kelkaj uloj komencis plendi pro ventrodoloroj. Tri el ni estis senditaj al la hospitalo (mi ne afekciiĝis, ĉar ne oftenas la noktomanĝojn kaj manĝis sandviĉon en la kantino, tiel por ili estas pli ĉipe). Sekventtage la leŭtenanto min admonis, dirante ke ni estas "ineskuloj", "ĉu ni havas la menstruon" kaj simile. Kio nin atendas el ĉi homoj? Ili ĉiam tiel "viraĉaj".

Nu, mi vin lasas, ricevu kisojn kaj salutu la aliajn.

P.S.- Skribu, sed atentu ĉar kelkfoje ili malfermas la kovertojn.

Mi sendos ĉi leteron el la vilaĝo."




# SANT CUGAT

Saluton al ĉiuj legantoj de la revuo Hejs Juneco. Mi prezentas al vi la Esperanto Grupon Jozefo Anglés de Sant Cugat del Vallès.

Mi parolos pri la kursfina festo, kiun nia prezidantino Trinitat García donis al siaj gelernantoj la tagon 28an de junio.

La akto estis agrabla. Ni estis kvin gelernantoj finintaj la kurson, kiuj ricevis insignon kaj esperantan materialon. Ni ĉiuj esperas jam komenci la novan kurson en oktobro.

Ni estis ĉ. 40 esperantistoj el pluraj lokoj, kaj honore al la gelernantoj ni aspektis en la aktosalono de la Kulturdomo de Sant Cugat, videobendojn pri esperanto kongresoj en Sant Cugat kaj Lleida.

Poste ni havis mirindan kunmanĝadon en la Ateneu Santcugatenc

Nome de la gelernantoj mi kore dankas sinjoron Johano Soler pro sia konstanteco kaj speciale ni dankas prezidantinon Trini pro sia "movado" ĉiuaspekte.

Je persona nivelo HURA! por la Sankta Kolomba ... Esperanto Grupo pro ĝia laboremo, ĝia bonfaro, kaj la intenco atingi la junularon, kiuj definitive estas la estontaj esperantistoj.

NOTO. Dum tiu akto oni prezentis la numeron 1 de la bulteno de la grupo Jozefo Anglés: La hela hirundo.

Por kontaktoj la adreso estas:
Grup d'Esperanto Jozefo Anglés
Pep Ventura, 1
08190 Sant Cugat del Vallés
Catalunya

Ana Andreu

# BARCELONA

Ekde la komenco de julio, Atomo organizas en sia sidejo de Carreras Candi, 36. Barcelona, la tiel nomatajn "junaj vendredoj" Temas pri renkontiĝo de junaj esperantistoj, por praktiki, interŝanĝi ideojn, diboĉi...

Por propagando Atomo eldonis afiŝon kun la jena teksto: esperanto, idioma jove i amb marxa (i a sobre t'el ensenyem)

trad. juna lingvo kaj kun "movado" (krome ni ĝin instruas al vi).

Ankaŭ oni eldonis algluaĵojn favore al esperanto, kontraŭ imperiisma angla lingvo, kontraŭ armeservo kaj kontraŭ NATO.



# KULTURA TESTO




I o KIOM DA HISPANAJ ĈEFURBOJ KOMENCIĜAS PER "V"?

- ○ 1 ☐ TRI
- 2 ☐ KVAR
- 3 ☒ NENIU

II o KIEL ESTAS PLI KONATA "EDSON ARANTES DO NASCIMENTO"?

- 1 ☐ SERVANTES
- ○ 2 ☒ PELÉ
- 3 ☐ EUSEBIO

III o KIU SKRIBIS "EL BUSCÓN"?

- 1 ☒ HEJS-JUNECO
- ○ 2 ☐ QUEVEDO
- 3 ☐ LOPE DE VEGA

IV o KIE NASKIĜIS "FRANCISCO DE GOYA"?

- ○ 1 ☐ FUENDETODOS
- 2 ☐ FUENDENADIE
- 3 ☒ EN LA UNIVERSALA KONGRESO DE E-O

V o KIU LANDO KONSUMAS PLI VINO "PER CÁPITA"?

- 1 ☒ ESPERANTUJO
- 2 ☐ HISPANIO
- ○ 3 ☐ ITALIO

VI o KIU USONA ŜTATO TROVIĜAS PLI ORIENTE?

- ○ 1 ☐ ALABAMA
- 2 ☐ LOUISIANA
- 3 ☐ MISSISIPI

VII o KIE NASKIĜIS ALADINO?


- ○ 1 ☐ ĈINIO
- 2 ☐ GERMANIO
- 3 ☐ MADRIDO

VIII o KIEL ONI SKRIBAS KATALUNE "TESTIKOJ"?

- 1 ☐ CULLÒNS
- ○ 2 ☒ COLLONS
- 3 ☐ QU YÓNS


IX o EKZISTAS EN LA BASKA, FIVORTOJ?

- 1 ☒ JES
- ○ 2 ☐ NE
- 3 ☐ NEK JES NEK NE




* LA RESPONDOJ ESTAS EN LA 10a PAĜO!

# Ĉu anglalingvanoj estas pli belaj ol la ceteraj?



*Kompreneble ne!*

*Okazis ke mi estis laboranta (ĉar mi laborasen teknika revua eldonejo) kiam oni diris al mi ke ni eldonos internacian revuon. Mi ŝatis tion kaj mi demandis: en Esperanto, ĉu ne? Kaj oni respondis al mi: Kompreneble ne!, la internacia revuo estas skribota angle.*


*Ĉu la anglalingvanoj estas pli belaj ol la ceteraj?*

*Neniel! Kaj oni diris al mi ke per la angla lingvo la revuo atingos la tutan mondon pli bone ol esperante*

*Mi scias la kialon: se estus Esperantujo kun pli altvalora monunuo ol la usona, Esperanto estus sendube la internacia lingvo kulture kaj komerce. Nun, tamen, Esperanto estas la internacia lingvo, sed komerce: "ĉu en la tuta mondo oni uzas la anglan?*

*NE, la tuta mondo, komerce, uzas la usonan aŭ la dolaran lingvon.*

*Ferriol*




*Netolerebla!*

*Ĵus okazis en Barcelona la 1an Kina Festivalo. Vere tre grava evento por nia urbo, kiu ĉiufoje estas pli moda.*

*Mi, kiu intencas iam esti aktoro, interesiĝis pri la festivalo kaj iris preni la programon. Sed jen, ĝi estis skribita katalune (tute normale) kaj angle (ne tiom normale).*

*Ankoraŭ mi estis pli ŝokita kiam la tagon de la inaŭguro la anoncanto faris la prezenton de la festivalo angle (meze de Rambla de Catalunya, centro de Barcelona)!!!*

*Mi energie protestas kontraŭ tio, ĉar evidente multaj eksterlandanoj vizitas BArcelona sed ili estas francoj, germanoj, ĉinoj.. Kial oni ne parolas iliajn lingvojn Aŭ kune kun la kataluna uzi la kastilian? Ĉar ja venas multe pli da hispanoj ol da eksterlandanoj. Tamen ne. La organizantoj pensas ke tio donas prestiĝon al la festivalo.*

*Prefere ili priokupiĝu pri pli bona kvalito de la filmoj, kaj ne nur pri bela aspekto de la festivalo*

*Jesuo*

Hejs Juneco, bai polita dela!

## el baskio

*La grupo en Gasteizo okazigis dum la monatoj de majo kaj junio, esperanto kurson dum du horoj semajne. Ni bonvenigas tiujn kvin novajn esperantistojn kiuj finis la kurson.*

*La gasteiza grupo kaj tiu de Bilbao renkontiĝis kun aragonanoj kaj riohanoj en Logroño la pasintan 18an de junio. Bedaŭrinde pri tiu informo ni ne havas pliajn konitaĵojn.*

*La plej interesa laboro de la Gasteiza Grupo nun estas la eldono de la revuo "la kvodlibeto", kiun oni diskonigis dum la madrida kongreso ĉijare. 16paĝa revueto verkita per amuza stilo, pri ĉiuj temoj. Oni uzas nur esperanton. En la revuo kunlaboras: Alfredo, Antono, Beni, David, Eústakio, Naĉo kaj Rafa.*




*Jen Hejs Juneco lanĉas konkurson por ebligi pli la kontakton inter la legantoj kaj la revuo. Ĝi estas tre simpla. Temas pri spritaĵoj. Jes, ja ne tre serioza konkurso, ĉu?*

*.Kompreneble povas partopreni kiu ajn havu bonan humoron.*

*.Atentu bone ĉar la spritaĵoj povas esti:*

*- originale verkitaj en esperanto, aŭ*

*traduko en esperanton de nacilingva spritaĵo.*

*NE VALIDOS SPRITAJOJ PUBLIKIG ITAJ EN ESPERANTO EN IU AJN R REVUO.*

*Limdato: 31a de oktobro 1987.*

*.Kompreneble subskribu per pseŭdonimo kaj en alian koverton metu papereton kun viaj konitaĵoj: nomo, adreso,(la junulinoj povas skribi la telefonnumeron)*

*.Ĝi povas ampleksi kiom ajn vi volu*

*PREMIO. Jarkotizo 1988a por HEJS.*

*Ankoraŭ plia surprizo: Inter la leteroj ricevitaj oni lotumos jaran abonon por la revuo KONTAKTO.*




# NOTICAJ DIVERSAJ

*Nia amiko Manuel Hernández zorgas nun pri ILEI en Hispanio. Ties nova sidejo sidas en tiu sama de Hejs Sol, 75. 41003 Sevilla*

*En Sevilla oni jam demarŝas ĉe EXPO 92 por atingi ke ili dungu deĵoranton pri esperantaj aferoj.*

*La fama angla kantisto Elvis Costello uzas esperanton en si lasta disko "Blood and Cho colate" (Sango kaj Ĉokolado)*

*Ĵus fondiĝis en Barcelona la Kataluna Aktora Trupo (KAT). Tiu grupo celas miaŭi en es peranto per teatraj ĵprezentoj aŭ filmaj bendoj. Ĝi konsistas el tri aktoroj: Joan Fe lip Artero, Ferriol Masip kaj Jesuo Armengol.*

*La pliusonaolkataluna artisto Xavier Purgat deklaris ke li forviŝis el sia testamento la hispanajn esperantistojn. Li koleras ĉar oni invitis William Auld anstataŭ lin al la madrida kongreso.*

*Noto. Por solvi tiun aferon, oni invitis lin al la "junulara" renkon tiĝo en Monistrol venontjare. Sed ne timu, temas pri profito de tiuj belaj junulinoj kiuj ĉiam akompanas lin.*





*Nia fama artistino Lola Floreada anoncis ke ŝi lernas esperanton por kanti eksterlande ĉar en Hispanio (laŭ ŝia diro) oni ne per mesas ŝin vivi pro impostoj.*

*Frank Ĉinatra aŭdinte la esperantan version de sia sukceso "strangers in the night", tiom multe ĝojis ke li anoncas la surbendigon de disko kune kun Amplifiki. La titolo estos: "Ni ankoraŭ estas junaj".*

Lola Floreada, kiu artiste

# Alberto Franco




*Ci kurioza intervjuo estis farita al Alberto pertelefone. Certe vi konas la sistemon spontaneaj respondoj al subitaj vortoj .Vi mem elprenu viajn konkludojn el la enketo la unuaj 11 demandoj temas pri esperanto. La aliaj 9 temas pri lia personeco.*

- *HEJS : Estonto.*
- *KABEJ : Fuŝo.*
- *LA ESPERO : Kantebla.*
- *ANDALUZIO : Lando.*
- *100 JAROJ : Jubileo.*
- *ESTONTECO : Hejs.*
- *KUNLABORO : Tre interesa afero.*
- (1) *8 MILIONOJ : Multe pli.*
- *PACO . Serĉinda.*
- *ESPERANTO MOVADO EN KATALUNIO : Se ne paroli pri politikoj, lingve - alta nivelo.*
- *ĜIS KIAM? : ĝis kiam vi volos.*
- *VIVI : Tre interesa aventuro.*
- *NE : Ofta respondo.*
- *AMIKOJ : Havindaj.*
- *VOJIRANTO NE ESTAS VOJO FARIGAS VOJO JE L'PAS' : Itaca.*
- *PLU-PLI : Mi pensas ke la unua rilatas al tempo kaj la dua al kvanto.*
- *SORTO : Kion la aliaj havas*
- *VIRO-INO : Kiam la rilato estas bona, la plej bona kuniĝo.*
- *DANKI : Eĉ ne putinan ideon.*
- *KION VI DIRUS AL LA TUTA MONDO, SE LA TUTA MONDO VIN AUSKUTUS? : Saluton amikoj, lernu esperanton!.*

*(1) Temas pri notico en angla ĵurnalo kie oni asertas ke ekzistas 8 milionoj da esperantistoj en la mondo.*

---

*EL LA PAĜO 6a.





**Se vi divenis pli ol 8 demandoj vi estas tre inteligenta.*

**Se vi divenis inter 5 ĝis 7 vi estas sufiĉe kulturita.*

**Se vi divenis inter 2 ĝis 4 atentu, ĉar ne sufiĉas.*

**Se vi divenis 1 aŭ 0, amiko mia vi devas studi multe pli*



# LA ZODIAKO



laŭ Prof. Ferriol Masip

Virŝafo



Sano. Se via poŝo plenas, vi sanas. Se via poŝo malplenas vi malsanas.

Mono. Vi iris al Krakovo kaj revenis sen eĉ unu duro.

Amo. Kun partnero taúro aú kaprikorno, vi havos bonajn sentimentalajn rilatojn kun aliaj homoj, sed atentu pri la kornoj.

Taúro



Sano. Sana aú malsana.

Mono. Poŝo plena aú malplena.

Amo. Bona aú malbona.

Gemeloj



Sano. Evitu seksajn rilatojn (ne estu stulta kaj prifajfu tiun konsilon)

Mono. Venu al mia trinkejo la biero estas ĉipa.

Amo. Via najbar(ino) amas vin sekrete.

Kankro




Sano. Se vi malbone fartas prenu aspirinon.

Mono. Pagu vian kotizon al Hejs.

Amo. Unu malmulte, kvin multe. Tri, la plej bona.

Leono



Sano. Ne fumu haŝiscigaredojn. Snifu kokainon.

Mono. Se vi snifas kokainon vi ne havos eĉ peseton.

Amo. Vi trovis amon en Krakovo. Kisu lin/ŝin perletere.

Virgo



Sano. "Bisolvon" por la tusado.

Mono. Se vi scipovas ludi violonon iru al la metroo.

Amo. Virgo, perdu vian virgecon!

Pesiloj



Sano. Atentu pri via pezo, vi tro dikiĝas.

Mono. Rompu vian kreditkarton. Ĝi nur kunportas ĉagrenojn.

Amo. Mi vidas bluan princon en via vivo.

Skorpio



Sano. Ne tro malbona. Nur hepatito, dentodolorojn, entranĉo en la mano, rompita kubuto kaj misdigesto.

Mono. Aĉetu loterian bileton aú vi neniam gajnos.

Amo. Konfesu ĉiutage ĉar vi ampekas kvazaú maŝino.

Arkpafanto



Sano. Nek manĝu kadukiĝintan joguron nek ludu rusan ruleton:

Mono. Vidu amon.

Amo. Vendu vian sekspupon kaj aĉetu konsolilon.

Kaprikorno



Sano. Tondu viajn kornojn aŭ grandigu la pordon.

Mono. Ne grandigu la pordon, ĉar laboristoj estas multekostaj.

Amo. Do, tondu viajn kornojn.

Amforo



Sano. Via okulo doloras, ĉu ne? Ekde nun kiam vi trinku kafon forprenu la kuleretòn.

Mono. Vi ne havas monon, ĉu ne? Trankvila estas normale.

Amo. Amiko mia sen mono, vi ne havos amon.

Fiŝoj



Sano. Ne purigu la plankon per la lango.

Mono. Forĵetu la pesetojn portantaj la vizaĝon de Franco. La porkoj tro pezas en via poŝo, sed neniom valoras.

Amo. Ĉu vi ŝatas la blondul(in)on viastratan. Do li/ŝi havas finĉ(in)on.

Ne taksu serioze ĉi zodiakon ĉar temas pri ŝerco de Ferriol

**Generale, ĉi monate la steloj anoncas bonŝancon en la konkurso de Hejs Juneco**

Spaco rizervita por la diskonigo de la urbo Santa Coloma de Gramanet



Santa Coloma de Gramenet situas mal dekstre de la riveru Besòs, proksime al Barcelono. La centraj aksoj de la urbo komunikas orienten kun Badalona kaj Sant Adrià, suden kun Barcelona kaj okcidenten kun Montcada i Reixac.

Oni trovis prihomajn spurojn de antaŭ 4500 jaroj kaj restaĵojn de vilaĝo apartenanta al la bronza epoko.

Ĝis komence de la 20a jarcento, ĝi estis vilaĝo dediĉata precipe al terkulturado sed, ĉirkaŭ la 20aj jaroj, pro la ekonomia disvolviĝo de Barcelona, Santa Coloma estiĝas, iom post iom, dormeja urbo.

Ekde la 60a jardeko, amasa enmigrado devigas konstrui apartamento-domojn ĉie, dise kaj misorde, ne priatentante la mankon de verdaj areoj.

Estas en la 70a jardeko kiam aperas la popolaj reagoj, postulante urbon pli verdan kaj pli loĝindan.

Tiel, dank' al la tri lastaj demokratiaj urbestraroj, Santa Coloma Ŝanĝadas sian propran bildon, por estiĝi ĉiu urbo sopirata de ni ĉiuj.

SANTA COLOMA.
juvulara urbo

anonco